


Brazila



Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE
BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Elirante ĉiumonate  Aparecendo mensalmente

REDAKCIO -- AVENIDA RIO BRANCO 153, 2.^o

RIO DE JANEIRO

BRAZILIO

B. L. E.

Honora Prezidanto — *Inĝ.^o Everardo Backheuser*

Prezidanto — *Inĝ.^o Alberto Couto Fernandes*

Vicprezidanto — *D-ro João Keating*

1^a Sekretario — *D-ro João B. Mello Souza*

2^a Sekretario — *Hernani da Motta Mendes*


Kasisto — *Edmundo Felix Tribouillet*

ENHAVO

Oka Universala Kongreso de Esperanto. — Malferma parolado de D-ro L. L. Zamenhof. — Brazila Ligo Esperantista. — Dua Brazila Kongreso de Instruado. — Esperanto oficial. — Esperanto kaj niaj Parlamentoj. — Sociedade Editora Esperantista. — Brazila Gazetaro. — Concurso para Brazila Antologia. — Parkurbo Esperanto. — Nekrologio. — Kroniko. O Esperanto no estrangeiro. — Novaj Gazetoj ricevitaj. — Oficiala Gazeto. — B. L. E. — Bibliografio. — Anoncoj.

Rio de Janeiro - Brazilio

GRUPOJ ESPERANTISTAJ



1906 — Marto — **“Suda Stelaro”**. Campinas—Ŝtato S. Paulo.— Prez. Ing^o Tobias R. Leite.

Junio—**Brazila Klubo “Esperanto”**.—Avenida Rio Branco, 153, 2^o andar, Rio de Janeiro.—Prez. Kolonelo Dr. Moreira Guimaraes.

Septembro — **Esperanta Klubo** — Aracajú -Ŝtato Sergipe.—Prez. D-ro Alcibiades Corrêa Paes.

1908—Marto—**G. E. de Bom Jardim**.—Ŝtato Rio. —Prez. João Alfredo Desiderio Combat.

1909—Marto — **Esperantistinaro**.—Gua-ratinguetá. Ŝtato S. Paulo.—Prez. S-ino Maria Antonietta Milliet.

Julio—**Norda Matena Stelo**.—Tamoyos n. 41 B. Belem. Ŝtato Pará.—Prez. Anna Sarah de Mattos.

1910—Julio — **Grupo Esperantista de Juiz de Fóra**. — Juiz de Fóra. Ŝtato Minas Geraes—Prez. Paulino Bandeira.

Novembro — **Esperantia Grupo de Bahia**. Ŝtato Bahia.—Prez. Kolonelo Deraldo Dias.

1911 — Januaro. — **Societo Esperantista Doktoro Baena**.—Belém. Ŝtato Pará. —Prez. Dr. João Pedro de Figueiredo.

Grupo Esperantista de Parahyba do Norte. —Prez. Aladio Amaral.

Aŭgusto — **Samideaninaro**. — Aracajú — Ŝtato Sergipe.—Prez-F.^{ino} Sylvia de Oliveira Ribeiro.

1912—Marto.—**Ortologa Universitata Rondo**.—Bahia—Prez. Dr. Magnus Söndahl.

Aŭgusto.—**Virina Klubo**. Strato General Severiano, 170.—Rio de Janeiro.—Prez. S-ino Maria Chalréo.

Ni publikigas nur la nomojn de l'grupoj kiuj aliĝis al **Brazila Ligo Esperantista** aŭ helpis **Brazilan Esperantiston**.

B. L. E.

UNUIĜO KREAS FORTON

A Brazila Ligo Esperantista (Liga Esperantista Brasileira) cuja directoria é annualmente eleita pelo Congresso tem por fim dirigir a propaganda do Esperanto no Brazil em questões de interesse geral, proceder a exames de Esperanto, dar diplomas de professores, auxiliar os grupos e representar em qualquer emergencia a opinião dos esperantistas brasileiros.

SEDE — Rio de Janeiro.

COTISAÇÃO ANNUAL. Cada grupo que adherir paga 10\$000 por anno e elege um delegado, de preferencia residente no Rio de Janeiro. Pode o Grupo escolher mais de um delegado, pagando nessa hypothese, 10\$ por cada um.

Qualquer pessoa pôde isoladamente adherir á Liga, pagando a annuidade de 5\$. Não ha joia.

VANTAGENS. Os grupos que adherirem á Liga gozarão das seguintes vantagens:

a) Recebem o «Brazila Esperantisto» para os socios com abatimento de 20 % do preço da assinatura annual;

b) Por intermedio dos seus delegados são informados das decisões da Directoria da Liga nas quaes tomam parte:

c) Gozam de abatimento nas edições da Liga e nas encomendas que por meio della fizerem de quaesquer obras esperantistas;

d) Recebem da Liga todo o auxilio que esta lhes puder prestar, em beneficio da propaganda e diffusão do Esperanto;

e) Podem publicar no órgão official da Liga informações mensaes sobre o movimento esperantista local.

NOTA. — A Liga não intervem em assumptos referentes á vida interna dos grupos filiados, podendo estes agir livremente de accordo com os fins para que foram creados.

Das vantagens c, d e e gozam tambem as pessoas que adherirem isoladamente á Liga, as quaes recebem o «Brazila Esperantisto».

As pessoas que desejarem adherir á Liga devem dirigir-se ao Sr. E. FELIX TRIBUILLET, thesoureiro, Avenida Rio Branco 153, 2^o andar. O remettente receberá o cartão de membro da Liga, e o «Brazila Esperantisto».

Quanto a adhesão dos grupos e demais informações, dirigir-se ao Sr. J. B. MELLO SOUZA, 1^o Secretario.



BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

4-a Jaro

Novembro - Decembro - 1912

Numero 7-8

JARABONO
En Brazilio 3\$000
Eksterlande 5 fr. (2 Sm.)

Elirante ĉiunmonate—Apparecendo mensalmente
REDAKCIO—AVENIDA RIO BRANCO, 153-2.º
RIO DE JANEIRO—BRAZILIO

Specimeno 0,fr. 50 (0,Sm. 20)
Num. avulso 300 réis
Helpabono 10\$000

Oka Universala Kongreso de Esperanto

Malferma parolado de D-ro L. L. Zamenhof

La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĝus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam — post longa naska preparado — aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpiĝas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas el sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, granda paciencon kaj persistencon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉanbrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience jetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! Grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ

flksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun medigitas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj, kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikiĝante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfete trankviligan respondon. Iu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute neniam diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj

pli elasta, ol la lingvo de infanc kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano nenion diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion en sia valoro ankaŭ en la nunatempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, — tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho vel ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos nenian nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Vander-Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablaĵoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasinta dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivi. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per levigo de iaj seĝoj.

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi «majstron», ke vi ĉesu honoru min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto, mi en tuta plene transdonis al la esperantistoj mem.

Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: «tion mi postulas» aŭ «tion mi deziras». Neniam mi povis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciente, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpiĝitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu

en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.

Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon.

La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉion, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donadis al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernis nur la aferon de la lingvo, fortensis de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estis simpatia kaj kiuj timis, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektatajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu «majstro», ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiu en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniu el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezajo de Zameuhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto *aparta*, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj kongresoj, estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj al kutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimumo nur homon kaj fraton.

Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.

*
**

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo

kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: «kiu pli laŭte krias, tiu estas prava». Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokkan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj «*espero, obstino kaj pacienco*»; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin *estimi* kaj *helpi*, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: «*konkordo*».

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable senluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia asta kongresa parolo, en sia «*kanto de cigno*», li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava lago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom

ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantismon, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukas iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtralehoma, sengenta lingva fundamento, tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

* *

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu nikunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe por honoro nian aferon kaj por agrablighi al ni nian restadon, dum la kongreso. Mi esperas, ke revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiujmontris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj, personoj kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon mi esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajni feston kaj sukcesan laboron.

L. L. Zamenhof.

Brazila Ligo Esperantista

Adheriram á Brazila Ligo Esperantista durante o corrente anno mais as seguintes pessoas: *Dr. Reinaldo Fred. Geyer*, do Rio Grande do Sul, *Dr. João Lustosa de Souza*, de Minas Geraes e *Ary Fernandes*, do Rio de Janeiro.

Receberam o diploma de *profesoro aprobata* as seguintes pessoas: D. D. Consuelo Menezes Paes e Sylvia de Oliveira Ribeiro, ambas de Aracajú e o Snr. Osmany Coelho e Silva, do Rio de Janeiro.

A Directoria da B. L. E. resolveu prorogar por mais um anno a disposição transitoria do Regulamento dos exames de *profesoro aprobata*, segundo a qual, nas localidades onde não haja professor de Es-

peranto, os candidatos poderão prestar exame por correspondencia sujeitando-se a provas especiaes á juizo da mesma Directoria.

ATESTO PRI LERNADO. — Continuum a ser distribuidos os *atestoj pri lernado* ás pessoas que já prestaram nos respectivos grupos o necessario exame elementar de Esperanto. Chamamos a atenção das Directorias dos grupos para a conveniencia da expedição desses diplomas, cuja taxa actual é de 1\$000, pertencendo a metade dos emolumentos arrecadados ao grupo que promover a realisação dos exames.

Pedimos insistentemente aos esperantistas isolados e aos snrs. secretarios dos grupos, que nos enviara sempre noticias sobre o movimento e propaganda nas suas cidades para que as possamos publicar na nossa *Kroniko*.

Dua Brazilia Kongreso de Instruado

En la fino de la monato Septembro okazis en Bello Horizonte, ĉefurbo de la granda ŝtato Minas, la kunveno de la brazilaj geinstruistoj, kun la oficiala apogo de la estraro de la citita ŝtato. Ĉe ĝi ĉeestis, krom granda nombro da profesoroj kaj instruistoj, reprezentantoj de la prezidantoj de l' ŝtatoj Amazonas, Pará, Bahia kaj S. Paŭlo kaj de la Ministro de Internaj Aferoj de Brazilio.

La kunvenoj okazis en la vasta salono de l' Ĉambro de Deputatoj kaj ilin prezidis nia samideano Dro Everardo Backheuser kiel oficiala reprezentanto de lia ministra moŝto Sro Rivadavia Correia.

Oni pridiskutis plej gravajn aferojn rilate al la publika instruado, la rimedojn por ĝin diskonigi en nia lando, la metodojn por praktike instruisciencojn kaj lingvojn. Kiam oni pritraktis tiun lastan punkton, nia samideano el Juiz de Fóra Sro José Patrocínio Pontes leviĝis kaj proponis la jenon:

“La 2^a Kongreso Brazilia de Instruado opinias ke oni devas prove enkonduki en la lernejojn la instruadon nedevigan de la internacia lingvo Esperanto.”

La ĝenerala raportanto Sro. deputato Nelson de Senna, famkonata pro liaj studoj pri historio kaj geografio, vige apogis la proponon kaj petis ĝian aprobon. Ĝi estis preskaŭ unuanime aprobata.

Krom Sro Patrocínio Pontes kaj Nelson de Senna, kiuj parolis pri la propono favora al nia lingvo, oni devas citi la klopodojn de niaj karaj samideanoj S-roj José Soares de Carvalho, Caetano Coutinho, Alberto Alves Vieira kaj Everardo Backheuser, kiuj tre bone batalis kaŝe por ĝia triumfo.

Eho de la kongreso rilate al Esperanto estas ankaŭ konferenco farita de Sro Backheuser en la Normala Lernejo pri la metodo de Sro. Jaques Camescasse por la lernado unuagrada de matematiko. En plena ĉambrego, kun la ĉeesto de plej gravaj eminentuloj de Minas nia samideano dum unu horo parolis pri praktika lernado de matematiko, citis la metodojn de Jean Macé kaj Laisant kaj fine montris la facilecon kaj la taŭgecon de l' *Inicilo* de Sro Camescasse. La normalernantinoj multe aplaudis la parolon de Sro Backheuser. Tiu ĉi ne forĝesis diri ke la konon de l' *Inicilo Matematika* de Camescasse li ŝuldas al Esperanto,

ĉar tiu eminenta matematikulo, kiel s-roj Laisant kaj Bourlet, estas ankaŭ esperantistoj.

Esperanto Oficial

Lei n. 605, de 24 de Setembro de 1912.

Dá nova organização á Instrução Publica do Estado de Sergipe.

O Presidente do Estado de Sergipe: Faço saber que a Assembléa Legislativa do Estado decretou e eu sanciono a seguinte lei:

Da Instrução e seus grãos

Art. 1.—A Instrução do Estado de Sergipe desmembra-se em publica e particular: a instrução publica, em *primária, normal e secundária*.

Parte Segunda

Ensino Normal

Organização Externa

Art. 68 —O Presidente do Estado poderá permitir o ensino da lingua internacional *Esperanto* na Escola Normal, contratando pessoa idonea com os vencimentos de professor.

§ Unico.—O ensino desta lingua não faz parte do curso deste estabelecimento, nem terá caracter obrigatorio.

Parte Terceira

Ensino Secundario

Organização Externa

Atheneu Sergipense

Art. 40.—O Presidente do Estado poderá permitir o ensino da lingua internacional *Esperanto* no Atheneu Sergipense, contractando pessoa idonea com os vencimentos de professor.

Art. 42.—O ensino da lingua *Esperanto* não faz parte de nenhum dos cursos do Atheneu nem terá caracter obrigatorio.

Palacio do Governo do Estado de Sergipe
Aracajú, 24 de Setembro de 1912, 24^a da Republica

General José de Sequeira Menezes

Sylvio da Motta Rabello



Tiu ĉi avenuo estas, sendube, la plej bela en nia ĉefurbo. En la hela konstruaĵo kiu vidiĝas dekstre (de l' leganto) estas la sidejo de Societo de Geografio kaj de B. L. E.

Esperanto kaj niaj Parlamentoj

Multajn fojojn ni jam rimarkigis kiom favoraj estas al nia afero la brazilaj parlamentoj, ĉu federala, ĉu ŝtataj. Pri tio ni aldonas kelkajn gravegajn informojn, kiuj certe ĝojigos niajn samideanojn.

Al la federala Deputatejo (Camara dos Deputados) apartenas nun kelkaj esperantistoj, el la plej kleraj kaj batalemaj, krom multaj deputatoj ĉiam favoraj al Esperanto. Ili estas: kolonelo Dro. Moreira Guimarães, la kara kaj indega prezidanto de Brazila Klubo, ĵus elektita deputato de l' ŝtato Sergipe; Sro Deraldo Dias, prezidanto de l' Esp. Grupo de Bahia, deputato de l' ŝtato de Bahia; Dro Antonio Carlos, la Bonfarinto de Esperanto, labor-omega deputato de Minas Geraes; Dro Corrêa Dfreitas, Dro Dunshee de Abranches, Coelho Netto kaj aliaj.

Dank' al la klopodoj kaj morala helpo de tiuj bonaj amikoj, ni esperas ke baldaŭ estos aprobita la projekto per kiu la Registaro donos al Brazila Ligo ĉiujaran monhelpon. Necesa estas insisti pri la graveco de tiu afero por nia propagando.

— En la Parlamento de l' ŝtato Rio de Janeiro (Assembléa Estadual) troviĝas nun, kiel deputato,

nia karega kaj malnova amiko D-ro Everardo Backheuser, honora prezidanto de Brazila Ligo. D-ro Backheuser prezentis ankaŭ nelonge al tiu *Assembléa* legprojekton per kiu de nun, por la ŝtataj oficoj, estos prefere elektitaj la kandidatoj sciantaj esperanton. Prezertinte tiun legprojekton (kiun aliaj deputatoj ankaŭ subskribis) Dro. Backheuser faris notinde belan paroladon, pri kiu raportis ĉiuj gazetoj de Rio kaj Nictheroi. Bedaŭrinde ni ne povas publikigi la tutan projekton, sed nur tion, ke ĝi estas verko de tiel klera samideano, kaj tio nedubeble garantias ĝian aprobon, kiu alportos al nia lingvo grandan profiton.

— Ankaŭ el la malgranda, sed klera ŝtato Sergipe, naskiĝlando de Tobias Barreto kaj Sylvio Romero, ni ricevis bonegajn informojn. La sciigo lasthore enpresita en la lasta n. de nia revuo konigis al niaj legantoj la gravegan decidon de l' ŝtata Parlamento, aprobitan de l' registaro de Sergipe, enkondukantan Esperanton en la programon de l' Normala Lernejo kaj ŝtata Gimnazio, kie ĝin instruos profesoroj pagitaj de la Ŝtato.

Pro tiel gravaj triumfoj, Brazila Ligo tuj sendis gratulajn telegramojn al la Prezidanto de tiu tate kaj al Dro Alcibiades Corrêa Paes, la vera animo de nia movado en Sergipe.

Sociedade Editora Esperantista

(Societo por publikigo de brazilaj verkoj)

Em 23 de outubro ultimo ficou definitivamente fundada a "Sociedade Editora Esperantista" que tem por fim editar obras, monographias e outros quaesquer trabalhos em ou sobre Esperanto, de preferencia de autores brasileiros, e entrar em accordo, ou celebrar contractos com sociedades congeneres existentes no estrangeiro para a propaganda, permuta e venda das respectivas publicações.

O capital social é de 10:000\$000, dividido em duas mil acções de cinco mil reis cada uma, ao portador.

E' possivel que a constituição desse capital seja modificada brevemente, com o augmento do valor das acções.

De accordo com os estatutos, o presidente da Sociedade nomeará commissões auxiliares, incumbidas do exame, escolha e revisão das obras a editar. Destas, a que deve apparecer em primeiro lugar é, segundo nos consta, a *Brazila Antologio*. Ha muito tempo já se faz sentir a falta dessa publicação de modo que, editando-a, a nova Sociedade prestará um grande serviço á nossa propaganda.

Approvados os estatutos na sessão de installação, foi immediatamente eleita a primeira directoria, assim constituida: Presidente: Dr. Antonio Carlos de Arruda Beltrão; 1º Secretario: J. B. Mello Souza; 2º Secretario: Dr. Alvaro Berford, que por motivos justificados, não poude acceptar, Thesoureiro: Lauriano das Trinas. Conselho fiscal: Dr. Nuno Baena, Dr. Everardo Backheuser e Hernani Mendes.

Para adhesões e mais informações, dirigir-se ao Sr. Mello Souza, 1º Secretario, Avenida Rio Branco 153, 2º andar.

BRAZILA GAZETARO

Brazilaj gazetoj kiuj dum la lastaj monatoj aperigis artikolojn kaj informojn pri nia movado:

Maranhão—*Diario Official*.

Pernambuco.—*Jornal Pequeno*, el Recife.

Alagôas—*O Mercurio*, el Maceió.

Sergipe—*O Estado de Sergipe*, el Aracajú.

Bahia—*Diario de Noticias*, kaj *A Bandeira*.

Stato Rio—*Ribeironense*, el S. José do Ribeirão, *Gazeta da Manhã*, *Fluminense*, *Diario Fluminense*, el Nictheroy, *Gazeta de Cordeiro*, el Cordeiro.

Rio de Janeiro.—*Canaan*, *A Folha Academica*, *Gazeta Suburbana*, *O Cosmopolita*, kaj ĉiuj ĉiutagaj ĵurnaloj, precipe *A Imprensa*, *O Paiz*, *Jornal do Commercio*.

S. Paulo.—*A Folha*, el Jundiahy, *Correio do Norte* el Guaratinguetá.

S. Catharina—*O Dia*, *Folha do Commercio*, el Florianopolis.

Goyaz—*Estado de Goyaz*.

Nota.—*Pedimos aos esperantistas que nos remetam um exemplar dos jornaes locais que publicarem artigos ou informações sobre o Esperanto.*

Concurso para Brazila Antologio

No nosso ultimo numero publicamos o resultado deste concurso com a relação dos trabalhos e nomes dos concurrentes que obtiveram os tres premios; hoje pouco temos mais a dizer.

Com excepção de algumas, que não preencheram todas as condições exigidas para o concurso, quasi todas as traducções poderão ser aproveitadas para a *Antologio*, depois de feitas as necessarias correcções, pois que, como já se tem dado em concursos anteriores, ha alguns enganos communs a quasi todos concorrentes, alem de erros grammaticaes.

Convem entretanto salientar que, em comparação com os concursos já realizados, a este compareceu muito maior numero de concurrentes e que facilmente se nota uma grande e geral melhora nas traducções, alem de encontrar-se já o verdadeiro *estilo esperanto*.

Parkurbo Esperanto

A fundação de uma cidade esperantista, ou pelo menos, de um nucleo de população esperantista, até pouco tempo era considerada uma utopia.

Mas o progresso do Esperanto tem sido tão rapido que essa *utopia* está em vias de realização.

Acaba de se constituir na Allemanha poderosa companhia, com o fim de fundar a *Parkurbo Esperanto* empreendimento grandioso e arrojado, conforme os leitores verão pela leitura dos avisos juntos ao presente numero de nossa Revista.

Dispensamos-nos de dar mais detalhadas informações, mas chamamos com insistencia a attenção dos leitores para esses avisos, cuja importancia será por todos devidamente apreciada.

NEKROLOGIO

Schleyer

Em 16 de agosto ultimo, exactamente quando se realisava em Cracovia o ultimo congresso de Esperanto, falleceu em Constance, na Allemanha, o venerando P. Martins Schleyer, um dos grandes percursos da lingua internacional.

Schleyer foi autor do *volapuk*, idioma que, tendo conquistado algum renome fracassou por completo, por não corresponder a todos os requisitos necessarios a uma lingua auxiliar.

Não obstante o insuccesso de sua obra, Schleyer muito fez em prol da idéa por que combatemos: e seus esforços, sem duvida, contribui am poderosamente para a diffusão do Esperanto. Por esse motivo, por proposta de Zamenhof, o Congresso Internacional de Cracovia prestou uma respeitosa homenagem ao illustre morto.

KRONIKO

Maranhão.—“Diario Official”, oficiala organo de l’ Registaro, montris sian fidon plenan al la venko proksima de Esperanto kaj malfermis siajn kolonojn al la propagando. Ĉiuŝaŭde tie aperas artikoloj kaj informoj pri nia lingvo, kaj tiu fako estas direktata de nia samideano profesoro Benjamin Mello, al kiu ni dankas pro tiu bona propagando.

Alagoas.—En tiea ĉefurbo, Maceió, post fervora propagando de s-ro Paulino Santiago, fondiĝis grupo sub titolo *Verdstelanoj*. Jen ĝia estraro: prez. Marcionillo Maciel; sekr. Paulino Santiago; kas. Pedro da Costa Ramos.

Sergipe.—Okazedel’ sankcio de leĝo pri Esperanto en tiu ŝtato, estas interŝanĝitaj la jenaj telegramoj:

«Prezidanto ŝtato—Sergipe. — Brazilaj «esperantistoj sin kungratulas kun vi pro «enkonduko de Esperanto en instruadon ĉe «Normala Lernejo kaj ŝtata Gimnazio. «*Alberto Couto Fernandes*, prezidanto de «Brazilo Ligo Esperantista.» D-ro Couto «Fernandes—Rio—Dankon. Esperanto estas ĉi tie kore multe lernata. Salutojn.—«*Generalo Siqueira*—

—Ankaŭ al d-ro A. Correia Paes, prezidanto de klubo de Aracajú, oni sendis gratulajn telegramojn.

Ricevis diplomon de *profesoro aprobata*, la jenaj estraraninoj de “Samideaninaro” de Aracajú: s-ino Consuelo Menezes Paes kaj f-ino Sylvia de Oliveira Ribeiro.

—“O Estado de Sergipe” publikigis en *esperanto* la tutan paroladon de d-ro Zamenhof en la oka kongreso internacia de Krakovo.

—Forveturis al ŝtato Ceará, nia samideano Democrito Rocha, kaj tie certe li daŭrigos esti la bona propagandisto kiel ĝis nun.

—En la urbo Laranjeiras, nia sindonema samideano f-ino Cecilia Curvelo instruas pri Esperanto dekdu el siaj lernantinoj. Ŝi estas direktorino de knabinlernejo “Santa Cecilia” kaj benega propagandistino.

Bahia—Ni sciigis pri ĵusa fondo de “Ortologa Universitato Rondo de Alagoinhas” La prezidanto estas d-ro Augusto Vergne de Abreu, juĝisto, kaj la sekretario, s-ro Carlos de Souza Cunha, profesoro aprobata de Esperanto.

—Laŭ telegramo ricevita de ĵurnalo “A

Imprensa”, *Unio Sociokrata* ĵus aĉetis grundojn en Villa Nova da Rainha, por 147 mil sm. por tie fondi esperantistan centron. La direktantoj estas s-roj Adolpho Cerqueira Lima kaj Joaquim Angelo,

Rio de Janeiro.—“A Imprensa”, kiu daŭrigas ĉiutage aperigi informojn pri nia lingvo, publikigis ankaŭ artikolojn pri la uzo de akuzativo en esperanto, kaj ĝia versfarado. Ĝi ankaŭ daŭrigis publikigi *galerion* de brazilaj esperantistoj kaj tie aperis plu la jenaj nomoj: E Tribouillet, Irene Amelia Santos, Maria Chalhéo, Christiano Kraemer kaj Alekso Fanzeres.

—“Fon-Fon”, semajna belilustrita revuo, publikigis kliŝon kun portreto de la estraro de Brazilo Ligo.

—La aŭtoroj de “Curso Elementar de Esperanto” sendis ekzempleron al *A Folha Academica*, studenta ĵurnalo. El tio jam rezultis du belaj artikoloj por Esperanto, de kies certa triumfo la redakcio sin deklaris tute konvinkita.

—Je la 10-a de Novembro okazis bela propaganda promenado de la aninoj de *Virina Klubo* al Leme, ĉirkaŭaĵo de Rio; ankaŭ ĉeestis multaj esperantistoj.

—Je la 9-a de Novembro kurso malfermiĝis en Madureira, direktata de s-ro Osmany C. Silva, dua kasisto de *Brazilo Klubo Esperanto* kaj ĵus aprobata profesoro de Esperanto.

—La geesperantistoj de Rio, dum kunsido, decidis festi la proksiman datrevenon de d-ro Zamenhof je la 15-a de Decembro.

La programo ĝis nun konsistas el kuna tagmanĝo, kinematografia kunsido, parola do, koncerto kaj esperanta ekspozicio.

Minas Geraes—La samideanoj kiuj havis la feliĉan okazon ĉeesti nian kvaran kongreson en Juiz de Fóra, certe neniam forgesos la ĉarman kaj simpatian f-inon Clotilde Jaguaribe, kiu tiel multe helpis nin dum la organizado de tiu kongreso. Nun ni plczure sciigas ke ŝi estas ĵus elektita de l’ Gimnazio de Juiz de Fóra por ĝia instruistino de piano, kanto kaj *Esperanto*. Gratulojn!

—Funkciadas kurso ĉe “Centro Spirita” de Juiz de Fóra, direktata de inĝ-ro João Lustoza, al kiu ĉeestas 20 gelernantoj.

Goyaz.—Nia bona samideano d-ro A. Perillo, nuna sekretario de internaj aferoj en ŝtato Goyaz, promesis tre baldaŭ tie malfermi kurson de Esperanto, kaj intencas fondi grupon en tiu ĉefurbo.

O Esperanto no Estrangeiro

Inglaterra. O Collegio Real dos Cirurgiões da Irlanda admittio o Esperanto no seu programma de exames.—O apparecimento de artigos e noticias sobre o Esperanto nos jornaes diarios da Inglaterra torna-se cada vez menos raro, graças aos esforços do Esperantista Gazetara Klubo.

Dinamarca. Realizou-se em Vegle com enorme successo a quarta reunião annual dos esperantistas dinamarquezes. Os jornalistas locais declararam-se francamente conquistados pelo Esperanto e puzeram as columnas de seus jornaes a disposição da propaganda.—Um novo jornal *Danlando* substituiu o *Dana Esperantisto*, que suspendeo a publicação.

França. Por ocasião dos ultimos exames de Esperanto realizados em Lille, inscreveram-se 125 rapazes e 104 meninas. Foram approvados 87 destas e 112 daquelles. Os exames foram prezididos pelo Snr. Gerardo, inspector escolar.—Por proposta do inspector das escolas de *Lons-le-Saulnier* o ministro da instrucção concedeo ao professor Payebéis uma medalha de bronze por ter leccionado o Esperanto durante quatro annos—Tres importantes jornaes francezes, *l' Eclair*, *Excelsior* e *l' Illustration*, enviaram representantes ao 8º Congresso Universal de Esperanto.—A Administração dos Correios e Telegraphos da França acaba de considerar o Esperanto como linguagem convencionada para a correspondencia telegraphica e nesse sentido foi enpedida uma circular a todas as estações.

Hespanha. O ministro da guerra concedeu uma menção honrosa ao capitão Julio Mangada pelo seu livro "O Esperanto ao alcance de todos".—

Italia. O Congresso Universal de Cracovia escolheu a cidade de Genova para sede do 9º Congresso a realizar-se de 3 de Agosto a 7 de Setembro de 1913.—Teve lugar em Verona com pleno successo o 3º congresso dos esperantistas italianos. Ficou resolvido que o 4º congresso effectuar-se-á em Bologna, em 1913.

Bulgaria. O dedicado esperantista Iv. Kres tanov fez uma serie de conferencias de propaganda em *Pleven*, *Chumenso*, *Provdia*, *Varna* e *Burgar*.—Realisou-se em 4 de Agosto o congresso annual da sociedade esperantista bulgara.—Em Sofia, o Dr. Iv. Cišmanov, ex-Ministro da Instrucção Publica, professor da Universidade, fez uma importante conferencia a favor do Esperanto.—A *Lumo*, que deixara de apparecer, recomeçou sua publicação.

Russia Asiatica. Em Kharbin o inspector das escolas primarias, M. J. mirov, e o engenheiro dos caminhos de ferro, M. A. Bašujev, fazem uma activa propaganda a favor do Esperanto.

Turquia Aziatica. A lingua internacional propaga-se rapidamente em Bagdad. A "Hebrew-Ottoman Union" adoptou o Esperanto como lingua official. Diversos professores da "Chaldean School" tornaram-se esperantistas.—O novo principe da Ilha de Samos annullou a lei que tornara obrigatorio o ensino de Esperanto nas escolas. A noticia não nos causa estranheza pois o actual principe é genro de um ardoroso *volapukista*.

China. Em Shang-hai funcionam quatro cursos de Esperanto, um dos quaes dirigido por M. Sai Yun Sen, ex-presidente da Republica chinesa.—O actual ministro da Instrucção Publica, M. Esaï Guinbeh, escreveu uma carta ao General Sébert, membro do Instituto da França, no qual declara que fa-

rá o possivel para espalhar o Esperanto por toda a republica.

Estados Unidos. Dois clubs esperantistas acabam de ser fundados a bordo de dois navios de guerra americanos: o *New Hampshire Neptune* e o *Rhode Island*.

Venezuela. Appareceu em Caracas um novo jornal de propaganda, o qual publicou em seu primeiro numero explicações grammaticaes redigidas em hespanhol.

Australia. Apesar da distancia que os separa da Europa, quatro Esperantistas australianos compareceram ao Congresso Nacional de Cracovia. Teve lugar em Melbourne, de 20 a 26 de Outubro, o 2º Congresso Nacional.

A. C. F.

NOVAJ GAZETOJ RICEVITAJ

Volga Stelo. Monata revuo. Redakcio kaj administracio: Sokolovaia: 136-Saratov, Ruslando.

Lumo. Monata bulgara revuo. Redakcio: Tirnovo. Bulgarujo. Abonprezo: 2,30 Sm.

Germana Esperanto - Instruisto Semajna gazeto por Esperanta instruado kaj propagando. Eldonejo: Magdeburg, Kaiser Friedrichstrasse, 1. Germanujo.

Oficiala Gazeto

N. 47 (25 Augusto 1912). Enhavo: *Oficiala Institucioj—Lingva Komitato.* Preparaj dokumentoj: Raporto pri dubaj tradukoj en *Universala Vortaro* (Pola parto). *Konstanta Komitato de la Kongresoj:* Raporto de la Prezidanto. Komisio por generala organizaĵo: Letero de Dro L. Zamenhof. *Esperantista Centra Oficejo.* Raporto de la Prezidanto de la Administra Komitato. Oficiala enskribo. (Sekvo). Internaciaj Asocioj. Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj (Naŭa raporto). *Aldono.* Bibliografio de Esperanto.

Esperanto kolonio

Por doni de tempo al tempo sciigojn kaj informojn pri la Esperanto—Kolonio fondota en Brazilio, al la multnombraj geinteresatoj, kiuj esprimis al li sian simpatian al tiu projekto, Srº Frederiko Mayerhauser redaktas bultenon, kiu aperos laŭbezone. La numero unua entenas la konstitucion de la fondota ŝtato. Ĝin verkis Dro Wolfgang-Pezlderer en Salzburg.

Oni povas peti ĝin al Srº Frederiko Mayerhauser, en Reichenhall (Germanujo) sendante respondokuponon por la respondo.

(El *La Revuo*)

BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

Curso Elementar de Esperanto em 28 lições, por M. Mendes e C. Fernandes. Typ. e Pap. S. José — Rua S. José, 29 e 31 — Rio de Janeiro — Brazilio. Prezo: 1\$500 (1 Sm).

El Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj.

I. Tradukitaj de N. Šarapov:
L. Tolstoj. *Dio unu por ĉiuj* (Surata kafejo. Prezo: 5 sd.

Unu animo en ĉiuj. Prezo: 5 sd.

Unua tupo, aŭ senmörtiga nutrado. Prezo: 11 sd.

II. Tradukitaj de N. Kabanov:
L. Tolstoj. *Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros.* Prezo: 5 sd.

» *Per kio homoj estas vivaj.* Prezo: 8 sd.

» *Du maljunuloj.* Prezo: 8 sd.

» *Kie estas amo, tie estas Dio.* Prezo: 7 sd.

» *Sieĝo de Sebastopolo.* Prezo: 9 sd.

» *Kaukaza militkaptito.* Prezo: 9 sd.

Aĉetebraj ĉe: Eldonejo de "Posrednik", Moskvo, Arbato, 36 d. Testov.

Totterley, la Historio de mortinto, verkita de la multŝatata angla romanisto Tom Gallon kaj tradukita de Andrew Wilson. Ĝi tute ne estas klasika, sed celas la ordinaran publikon, kiu preferas nepezan legadon por agrable pasigi liberan tempon. British Esperanto Association. 133-136, High Holborn, W. C. London. Prezo: 0,75 Sm.

Esperanta Abelo. N. 18. *Fabloj de Lokman la ŝaga.* N. 19. *Kristo ĉe la festo de Purin.* Unuakta dramo de Johano Bovio. N. 20. *Kompararo* laŭ itala lingvo. N. 21. *La Urbo kiu dormas. La Urbo de l' revoj*, de Amicis Edmond. Ĉiuj tradukitaj de A. Tellini. Esperanto-Oficejo. Bologna. Italujo.

La Internacia Organizo de la Esperanto-Movado. Kritikaj artikoloj de D-ro Smulders, membro de la Holanda Societo Esperantista "L. E. E. N. r." Mendebla ĉe: S-ro Sleijffers, Prins Hendrikstraat, 93, Den Haag. Holande. Prezo: 10 Sd.

Titolaro de esperantaj verkoj tradukitaj el la Rusa Literaturo, kun antaŭparolo de B. Kozin. Eldonis "Esperanta Biblioteko de Georgo Davidov en Saratov." Librejo "Esperanto", l'verskaja, 26. Moskvo. Ruslando. Prezo: 10 kop.

Tutmonda Jarlibro Esperantista — 1912. (Korektita ĝis la 1^a de Julio 1912). Kajero deknaŭa de la Esperantista dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj. Esperantista Centra Oficejo. 51, rue de Clichy — Paris. Prezo: Fr. 2,50.

Autour de l' Esperanto. Discussion de quelques modifications projetées. Verkita de Camille Aymonier. Office Central Esperantiste; 51, rue de Clichy — Paris. Prezo: 0,50 fr.

Intermita Sciigo. N-ro 1-1912 La pacparlamentokaj ĝia organizo. Parolado de Brynjulf Jhss. Klingenberg. inf. kapitano.

"LA ONDO DE ESPERANTO"

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis **senpage** romanon de A. Tolstoj "*Princo Serebrjanij*"; kies prezo por ne-abonintoj estas **Sm. 1,60 afr.** Nun ĉiu abonanto de la j. 1913. — krom 12 n-roj de l' gazeto, — **senpage** ricevos **donace** belan Esperlibron:

"ORIENTA ALMANAKO"

el lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.

"La Ondo" aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16 — 24 paĝ. Formato 17 × 26. Bela kovrilo.

La abonpagon (2 rubl. = 2, 120 sm). oni sendu al librejo "Esperanto" (Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librejoj — poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpag. de Esp. ĉekbanko.

Oni abonas ĝin pere de "Brazilia Esperantisto"

Internacia Pedagogia Revuo (I. P. R.)

oficiala organo de

Internacia Asocio de Instruistoj (I. A. I.)

Membra kotizaĵo por unu jaro kun la monata revuo: 1 Sm. (2,50 fr.)

Administracio: Boomsche Steenweg, 444, Antwerpen — Belgujo.

Scienca Gazeto

Internacia monata revuo pri Scienco kaj Industrio. Oficiala organo de la *Internacia Scienca Asocio Esperantista*.

Redakio: Ch. Verax, 55, boulevard Arago, Paris (XIII) Administracio: Hachette & Cia 79 boulevard Saint — Germain, Paris. Jarabono 7,50fr. — 3 sm.

Curso Elementar de Esperanto

em 28 lições por

M. Mendes e C. Fernandes

PREÇO 1\$500

A' venda nas principaes livrarias e na séde do Brazilia Klubo "Esperanto," á Avenida Rio Branco n.º 153, 2º andar, Rio de Janeiro.

TARIFO POR ANONCOJ

1 Paĝo Sm. 15.	20\$000
1/2 » 8.	12\$000
1/3 » 5.	7\$500
1/8 » 3..	4\$000
Por 2 foja anoncado rabato da 15 %	
Por 3	20 %
Por 6 »	30 %

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

Organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj

Jara abono..... 5 fr.

Aperas ĉiumonate, krom en Septembro.
Ĉiuj esperantistoj devas ĝin aboni.

Redakcio kaj administracio, 51 rue de Clichy, Paris.

ALVOKO!...

Magnus Söndahl, instituinto de l'Ortologio kaj fondinto de l' Sociokrataj Borgoj, proponas al ĉiuj interesuloj la solvon de la problemo de l'estingado de l' Paŭperismo; mentala kaj materiala.

La estingado de l' Paŭperismo mentala solviĝas per la senpaga Instruado de l' "**Universitato Ortologa**": la estingado de l' Paŭperismo materiala, per la instituido kaj aplikado de l' "**Plutometria Sistemo**", kaj per la starigo de l' "**Sociokrataj Borgoj**" aŭ **Gardenurboj**.

Petu klarigojn.

Per la akiro de unu sola Titolo de l' Kooperatio, kiu nur kostas 20 frankojn, ĉiu persono rajtigos li- enposedon en ĉiuj Borgoj de l' Kooperatio, kaj povas tie sin enloĝigi kiam ĝi volos.

Petu Statutojn kaj Prospektojn!

Turnu vin al

Dro. MAGNUS SÖNDAHL!

Inspector Agricola

Salvador-Bahia-Brazillando-SudaAmeriko

Vortaro Esperanta Portugala

KOMPILITA DE TÖBIAS R. LEITE

Um volume in 16, 176 paĝa..... 1\$500
Aĉetebla ĉe

Francisco Alves & C.

166, rua do Ouvidor.— Rio de Janeiro.

— Kaj ĉe ĉiuj eldonistoj de «La Revuo».

LINGVO INTERNACIA

Monata Centra Organo de la Esperantistoj
nur en Esperanto

(48 p. 13 X 20)

Jara abono 5 fr. (2 Sm)

Administracio: Presa Esperantista Societo.
33, rue Lacépède, Paris.

LA REVUO

Internacia literatura Gazeto. Kun la konstanta kunlaborado de Dro. Zamenhof.

Jara abono 7 fr.

Redakcio kaj Administracio ĉe Librejo Hachette & C, 79, Boulevard S. Germain. Paris.

DR° JOSÉ ARTHUR BOITEUX

ADVOKATO

Strato Hospicio, 24

RIO DE JANEIRO

LIVROS

Na sêde do Brazila Klubo, á Avenida Rio Branco n. 153, 2º andar, encontram-se á venda os seguintes livros:

<i>Brazilio</i> . Parolado de Sro. E. Backheuser	1\$000
<i>Methodo theoretico e pratico do esperanto</i>	
por Honorio Rivereto.....	1\$000
<i>Lina</i> , comedia, por Pedro A. Coutinho..	1\$000
<i>Esperanto</i> . Conferencia do Dr. Antonio de Arruda Beltrão.....	\$500.
<i>Karto</i> , facila legolibro, de Privat.....	\$500
<i>Parizina</i> , poemo de Byron, esperantigita de Dr. Venancio da Silva.....	1\$090
<i>Curso Elementar de Esperanto</i> , por M. Mendes e C. Fernandes.....	1\$500

Ha tambem cartões postaes de propaganda, pelo preço de 50 rs. cada um, ou 600 rs. e 800 a duzia.

Livros em Esperanto

Acham-se á venda na Livraria de Jacintho Silva, á rua Rodrigo Silva n. 7, e na Papelaria Ideal, á rua Sete Setembro, 163, diversos livros em esperanto.